

LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
WEST-GRAFTDIJK
(N.H.) NEDERLANDO
GIRONUMERO 209354 NEDERL.

JARABONO:
NEDERLANDO:
0,80 GULDENO
ALIAJ LANDOJ:
14 FR.FR.; 0,70 DOL.; 2,1 SV.FR.

F. H. VAN

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

PIETRO

Okazis en Italio. Sur la deklivo de la Vesuvius staris la kabano, en kiu jam multajn jarojn ili loĝis triope : la patrino, Lara kaj Pietro. En la nordo ili vidis la grandan urbon Naplo, kun ĝiaj blankaj domoj, kiuj brilis en la sunlumo tiom, ke la okuloj doloris, kiam oni longe ilin rigardis. Sur la blua akvo de la golfo glitis sennombraj fiŝist-barketoj kiel viglaj, blankaj birdoj. Kiom ofte Pietro jam deziris kunveturi !

Sed tio ne okazis. La patro perdis sian vivon surmare; kaj post tio la patrino malfidis la maron; ĝi estis tro danĝera amiko. Pietro do laboris en la vinberejoj aŭ sur la kampoj. Dum sia laboro li daŭre vidis la malhelan, malakran konuson de la Vesuvius, kies supro ofte portis grandegan funnubon.

Kiom feliĉe tie. Kiam Pietro vespere hejmenvenis, la malgranda Lara ludis antaŭ la pordo, kaj ŝi kuris al li renkonte sur siaj nudaj, brunaj piedetoj. Ŝi multe ĝojis, kiam la frato ŝin metis sur la ŝultron, kie ŝi povis tiri lin je la haroj.

„Vi nun estas mia ĉevalo, Pietro. Hu, hu, pli rapide, ĉevaleto!”

Kaj Pietro kuregis, ĝis kiam li ne plu povis. Ĉe la pordo staris la patrino afable ridante.

„Brave, mia filo. Via fratino havas neniun kamaradeton por ludi krom vi. Sed nun demetu ŝin kaj ripozu. Certe vi estas laca. »

Ili eksidis triope ĉe la tablo kaj konsumis la malluksan manĝon, kiu tamen bongustis.

„La patro devus vidi, ke vi estas jam tiom granda kaj jam helpas min gajni la vivpanon,” diris la patrino, kiu fieris pro sia brava filo.

„Kiu estas la patro?” demandis Lara.

„Vi neniam konis lin, karulino.” Kaj la patrino kisis ŝin kun larmoj en la okuloj. „Li estis la plej brava viro, kiu iam vivis; sed

la maro forprenis lin de ni. Mi tre ĝojas, ke Pietro ne estas fiŝisto. La maro estas danĝera.”

„Sed ankaŭ la tero, patrino. La lastajn tagojn la Vesuvius tiom multe grumblis. Kiam ĝi eksputas, tiam estas pli danĝere ĉi tie ol sur la maro.”

„Jes, sed sur la tero oni povas forkuri de la danĝero.”

„Jes, ĉi tie ni povos forkuri.”

Kaj post tio ili ne plu parolis pri la vulkano.

Tiel ili vivis triope en trankvila kontenteco. La Vesuvius portis sian fumnubon, grumblis de temp' al tempo, sed eksplodo ne venis. Kaj same kiel ili, vivis centoj da aliaj homoj sur la deklivoj de la vulkano. Unu horetan pli malproksime kuŝis eĉ granda vilaĝo, Torre Annunziata, kies loĝantoj ĉiutage la fumon vidis leviĝi el la monto. Sed ili estis same trankvilaj kiel Pietro kaj lia patrino. Povus esti, ke jarcento pasus, antaŭ ol denove okazos eksplodo. Kaj se okazos tio, ili ja povos forkuri!

En Aprilo de la jaro 1906 la Vesuvius grumblis pli minace ol iam antaŭe. El la kratero leviĝis fumkolono, densa kaj nigra, kiu fariĝis eĉ timiga nubego, pendanta super la pinto.

„Mi diris al la bienmastro, ke mi morgaŭ verŝajne restos hejme,” diris Pietro vespere al sia patrino.

„Kial, mia knabo?”

„La homoj en la vilaĝo ne fidas la monton. Ili timas, ke venos eksplodo. Kaj tiuokaze mi volas esti ĉe vi kaj Lara. Ĉar nia patro ne plu estas, mi devas ŝirmi vin kontraŭ danĝero.”

Li diris tion kun brilantaj okuloj. Nur dekkvinjara li jam sentis sin viro. Lia patrino ne respondis, sed silente premis lin al sia koro.

Tiun vesperon ili sidis longe antaŭ la pordo de sia domo, aŭskultante la obtuzan bruon, kiu resonis sub la tero kiel muĝado de malproksima tondro. La malgranda Lara ankoraŭ ne komprenis, ke danĝero ilin minacas. Ŝi montris la ĉiam pli kreskantan fumnubon super la kratero, kiu ruĝe rebrilis je la malsupra flanko, kaj ŝi kriis: „Vidu, kiom bele! Fajro, nur fajro!”

Jes, ili mem vidis tion. La kaŭzo estis la ardanta lafo interne de la kratero. Tiun nokton ili malmulte dormis; nur Lara estis senzorga. La patrino estis febra kaj plendis pri kapdoloro.

Matene ŝi ne povis leviĝi. Ŝia vizaĝo ardis kiel fajro, la lipoj estis sekaj. Ŝi suferis pro forta febro. De temp'al tempo ŝi iom dormis kaj ĉe la vekigo ŝi ĉiam deliris.

„Ĉu panjo estas malsana?” demandis Lara.

„Jes, Lara; vi estu tre kvieta, por ke la patrino rapide saniĝu.”

Kaj Pietro restis hejme kaj faris la mastrumlaboron, dum Lara ludis ekster la domo. Intertempe la subtera tondrado ĉiam daŭris. Subite la tero tremis sub iliaj piedoj. Plorante Lara enkuris la domon kaj serĉis rifuĝon en la brakoj de Pietro.

„Estu kvieta, esta kvieta, fratino; ĉi tie vi estas sekura.”

Sekura, jes, sed kiom longe? Certe okazos tertremo. Ĉu la muroj ne krevos, la dometo disfalos, kaj ili kovriĝos per la ruboj?

Ho, ke ĝuste nun la patrino kuŝas malsana. Pietro iris al la lito kaj rigardis la malsanulinon. Ŝi dormetis. Ĵus ŝi levis la palpebrojn kaj alrigardis lin, sed ne rekonis. Ho, ke ili povu forkuri! Silente li plektis la manojn kaj preĝis : „Bona Dio, baldaŭ sanigu nian patrinon. Tiam ni povos forkuri.”

Jen preterveturis kamparano kun sia ĉaro. „Ĉu vi deziras kunveturi, Pietro? Mi iras al Torre Annunziata. Ĉi tie nun ne estas sendanĝere.”

„Mi ne povas, Martinetti. La patrino estas tre malsana. Dankon pro via propono.”

La kamparano daŭrigis sian vojon, sed forveturante li kriis ankoraŭ : „Ne restu longe. Fariĝas danĝere.”

Kaj for li estis.

Fariĝis tiam mallume ekstere, kvazaŭ la nokto falis. La nubo super la kratero larĝiĝis, disŝiriĝis, kaj falis pluvo el arda cindro, kiun la vulkano suprenĵetis. Kiam peceto da cindro trafis la haŭton, ĉi lasta tuj brulvundiĝis. Rapide Pietro kaj la fratino eniris la domon. Ili vidis tra la fenestro, ke la pluvo kovras la tutan ĉirkaŭaĵon per grizblanka polvo, en kiu ankaŭ grandaj kaj malgrandaj ŝtonoj troviĝas, ĉio brulige varma.

La knabino time ĉirkaŭprenis la fraton, kiam nova tondrado eksonis, aŭ kiam la planko tremis pro nova tertremo. Feliĉe ilia dometo ankoraŭ eltenis.

Subite ree ektondris. El la kratero supreniĝis fajrokolono, kiu vaste lumigis la ĉirkaŭaĵon. Estis kvazaŭ la ĉielo brulis. Pecoj da ardanta granito estis supren ĵetegataj per grandega forto. Nun tremis kaj ondis la tero sub la piedoj. La lafo liberigis sin el la kratero. Arde ruĝa ĝi malsuprenfluis kiel dika kaĉo.

La cindropluvo iĝis malpli densa, sed nun minacis pli granda danĝero : la lafo. Ĝi ja plurfoje jam inundis vilaĝojn kaj urbojn! Pietro flugis al la pordo por elrigardi : manon super la okuloj. Granda Dio, la lafo fluas en tiu ĉi direkto!

„Patrino, patrino, leviĝu; ni devas forkuri!” li petegis en sia angoro.

La malsanulino rigardis lin per vitrecaj okuloj, sed ne donis respondon. Evidente ŝi eĉ ne rekonas lin. Kaj Lara, vidante ke la patrino ne respondas, laŭte ekploris.

Kion li faru ? Forkuri kun Lara kaj lasi pereji la patrinon ? Aŭ resti ĉi tie, kaj klopodi savi ŝin? Kun la risko, ke ĉiuj tri perdos la vivon!

Kaj ĉiam pli la lafo alproksimiĝis.

Aperis forkurantoj sur la mallarĝa montovojo. De ĉie ili aperis el la mizeraj dometoj, kiuj kuŝis dise inter la vinberkulturejoj. Virinoj, infanoj, viroj, kelkaj nudkape kaj duonvestite, la plimulto kun infanetoj surbrake. Sovaĝe ili kuris laŭ la deklivo malsupren antaŭ la lafofluo. Se ĝi atingos ilin, ili estos perditaj. Kaj kiom rapide la varmega, bruna ŝlimo persekutas ilin! Tiom rapide, kiom homo ne povas kuri.

„Forkuru, knabo, forkuru!” ili kriis al Pietro jam de malproksime.

Pasie li kisis la plorantan Lara'n kaj transdonis ŝin al iu kamparano.

„Ĉu vi zorgos pri ŝi, Bettinelli?”

„Kvazaŭ por propra infano, Pietro. Sed kial vi ankoraŭ hezitas forkuri?”

„La patrino estas tre malsana. Mi ja ne povas lasi ŝin sola!”

„Ni ne havas veturilon ĉi tie. Alie ni povus kunveturigi ŝin.”

„Ĉu ni portu ŝin?” prezentis unu el la kamparanoj.

„Tiuokaze ni ĉiuj pereos, ĉar la lafo tuj atingos nin.”

La aliaj homoj devis jesi tion. „Postlasu la virinon,” diris iu alia. „Vi tiel almenaŭ savos vin mem.”

Kolera Pietro sin turnis. „Malkuraĝulo,” li diris. Kaj tiam per firma voĉo : „Mi restas; eble venos iu savo. Povas esti, ke la fluo restos iom flanke de nia domo.”

La kamparanoj levis la ŝultrojn kaj pluen kuregis; pro la haltado la lafo estis jam pli proksima.

Pietro postrigardis ilin malĝoje, ĝis kiam ili malaperis ĉe vojkurbiĝo. Tiam li eniris la domon. Vane li klopodis instigi la malsanulinon al leviĝo. Ŝi deliris kaj ne plu rekonis lin.

Dume la vulkano daŭre bruis kaj vomis lafojn, kiuj kun timiga rapideco malsupren fluadis. Kampoj kaj vinkulturejoj malaperis kaj la fluo proksimiĝis ankaŭ al la dometo, en kiu troviĝis la brava knabo.

Lara trovis same kiel la aliaj homoj rifuĝon en Torre Annunziata; kaj kiam la sekvintan tagon ankaŭ ĉi tiun vilaĝon minacis la lafo,

ili forkuris al Naplo. Torre Annunziata mem estis pligrandparte kovrata de la lafo. De la kabano restis neniom krom la tegmento. La brava knabo pereis...

Trad. : VANE.

? E N I G M O J

a, a, d, d, f, f, g, i, k, k, k, l, l, l, l, m, n, n, n, o, o, o, o, o, o, o, o, o, u, u, v, r, s. Sur la unua linio staras

1. x nomo de tago
2. x sur la dua : bela arbo
3. x » » tria : forta hundo
4. x » » kvara : parenco
5. x » » kvina : bela danco
6. x » » sesa : fluidaĵo
7. x » » sepa : trinkaĵo
8. x » » oka : knabo sen gepatroj.

La vortoj konsistas el 4 aŭ 5 literoj, kaj se vi legas la unuajn literojn de supre malsupren vi trovos antaŭnomon de konata persono.

A'dam (Ned.) F. FRANSEN Jr.

Jen 10 vortoj, kvinliteraj. La unuaj literoj de la vortoj (legataj de supre malsupren) formas konatan, ŝatatan nomon. La vortoj signifas :

1. aparaton por lumigi
2. ilon por fiksi ŝipon
3. nomon de monato
4. nomon de granda lando
6. insekton, kiu produktas mielon
7. alian, pli malican insekton
8. egiptan birdon
9. senpiedan ringforman besteton
10. parencon

Sybrandaburen (Ned.)

TINKELENBERG.

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis 15 decembro 1937.

LA SOLVOJ EL No. 2-3

1. Mano, pano, rano, vano. 2. Leĝo, neĝo, reĝo, seĝo.

Premion gajnis : M. Seilberger, Rotterdam (Ned.). D. Andéolic, Gjelekovec (Jug.).

K O R E S P O N D A D O

F. d. C. en Lisboa (Port) : La saman rakonton ni jam ricevis.

A. en Gjelekovec (Jug) : La enhavo ne estas sufiĉe interesa.

V. G. en Nikolaev (Sov.) : La enigmo ne taŭgas por „La Juna Vivo”.

F. en St. Polten (Aŭstr.) : Kvankam interesa, la enhavo ne taŭgas por „La Juna Vivo”.

V. en Zagreb (Jug.) : „La Koko” ni enpresigos; similan rakonton ni jam enpresigis. Eble vi povos sendi ion alian.

L. en V. (Franc.) : Kelkfoje ni jam ricevis mesaĝojn de infanoj. Laŭ mi ili ne multe valoras.

18. NI ESTAS JUNAJ.

(Germana)

Marŝritmo.

Al jun - ul' sin mond' mal - fermas, Ho, la
 be - la, vasta mond'! La so - pir', es - per - ro
 ĝermas Migri kvazaŭ akva ond'. Fratoj kapojn ne mal -
 le - vu; Ste - lojn ja ne vi - dus vi. Su - pren
 vi - du, gajri - ce - vu Ĝo - ju do, ĉar junaj ni.

Ĉu ne kuŝas post arbaro
 Tie vasta, fremda land'?
 Ĉu sur verda la montaro
 Kreskas ne fremdeca plant'?
 Trans supraĵoj, kampoj, valoj
 Ni migradu kun pasi',
 Ĉiam sub ĉielaj haloj
 Ĝoju do, ĉar junaj ni!

Monten! Kaj al ni la suno
 Montru vojon tra kampar'.
 Se post tag' aperos luno,
 Lumos ĝi kun la stelar'.
 Ligu la dorssakon, frato,
 Migru ni laŭ tradici' :
 Malgraŭ vento kaj pluvado.
 Ĝoju do, ĉar junaj ni.

(J. Brand-M. Englert)

Trad. OSKAR BREDDERMAN.

*) El : Internacia Kantaro „La Juna Vivo”.

Prezo : 0,35 gld. aŭ tri respondkup.

Por komencantoj.

TALPO KAJ ERINACO.

La vintro venis kaj la erinaco iris al la talpo kaj petis de ĝi lokon en ĝia kaverno. Ĉar la erinaco multe timis la malvarmon.

La talpo donis sian konsenton. Sed apenaŭ la erinaco envenis, kaj ĝi jam faris, kvazaŭ ĝi estis hejme. Ĝi sternis sin sur la tero kaj per siaj pikiloj ĝi daŭre pikis la gastiganton.

Nur nun la kompatinda talpo komprenis, ke ĝi agis senpripense. Ĝi ĵuris, ke tio ne estas eltenebla kaj, ke la erinaco devas foriri. Sed la erinaco ridis kaj diris : „Al kiu ne plaĉas ĉi tie, tiu foriru. Mi mem estas tre kontenta kaj restas.”

TRO MALGRANDA POR DU PERSONOJ

Frederiko la Granda estis iam en sia laborĉambro, kie li rigardis kelkajn paperojn. Dume unu el liaj korteganoj vidis sur la tablo la oran flartabakujon de la reĝo; li ne povis kontraŭstari la tenton forpreni iom da tabako.

Tamen la reĝo vidis tion en spegulo. Li prenis la tabakujon kaj demandis al la kortegano, ĉu ĝi plaĉas al li.

„Ho jes, via reĝa moŝto,” diris la viro konfuzite.

„Nu,” diris Frederiko, „akceptu ĝin kaj konsideru ĝin kiel vian posedaĵon; por ni ambaŭ ĝi estas tro malgranda.”

Respondu skribe al jenaj demandoj :

Kiu estis en sia laborĉambro? Kion li faris tie? Kio estis sur la tablo? El kio konsistis la tabakujo? Kiu vidis la tabakujon? Kion faris la kortegano? Kion la reĝo vidis? Kiel li vidis ĝin? Kion li faris? Kion li demandis al la kortegano? Kia estis la viro? Kion li respondis? Kion donis Frederiko? Kial li donis ĝin al la servisto?

EN LA ARMEO.

La kapitano faras esploron pri la puremo de siaj soldatoj.

„Kie estas via dentbroso, Simpel?”

„Jen, kapitano,” diras Simpel kaj li montras grandegan broson.

„Sed tio ja ne estas dentbroso; vi povus ĝin neniel enpremi en la buŝon!”

„Sed ja ne estas necese, kapitano. Mi elprenas la dentojn!”

LA OPTIMISTO.

Malgranda ŝipo veturis al la norda poluso, kaj dum la vintro ĝi pereis. Du maristoj sin savis kaj sidis sur glaci-pecego. Feliĉe ili estis optimistoj ĝis la plej altaj pintoj de siaj haroj. Subite alproksimiĝis tre malsata glaci-urso. Kvankam ili havis neniun armilon unu el la du optimiste proponis : „Amiko mia, ĉu ni kaptu la urson? Ni dresu ĝin, kaj hejme gajnos multe da mono per ĝi!”

LA FILOZOFO.

Petro malŝatis labori. Tial li fariĝis almozulo. Dum longa tempo ĉio iris bone, sed fine li estis arestata. Li devis aperi en la juĝejo. Post la verdikto la juĝisto demandis al li, ĉu li ion povas diri por defendi sin. Ĉar Petro estis filozofo li diris : „Kial almoz-peto estas krimo, se almozdono estas bonfaro?”

Tasko :

1. Kopiu kaj traduku en vian kajeron : „Talpo kaj Erinaco”, „Tro malgranda por du personoj”, „En la armeo”, „La optimisto”, „La filozofo”.
2. Lerne parkere : „Talpo kaj erinaco” kaj „En la armeo”.
3. Rakontu per propraj vortoj la enhavon de „La optimisto” kaj „La filozofo”.
4. Faru verkaĵon pri la utilo de esperanto.
5. Rakontu ĉion, kion knabo parolas kun librovendisto, kiam li estas ĉe li por aĉeti libron pri fabeloj.



RICEVITAJ ESPERANTAJOJ

KONGRESA LIBRO DE LA TRIDEKA KONGRESO DE ESPERANTO-ASOCIO DE N. AMERIKO. Julio 1, 2, 3, 1937. 28 paĝa, ilustrita kun kelk-kolora kovrilo. Eldonis EANA.

DOKTORO PIERRE CORRET, Esperantisto kaj Stenografio. Parolado de P. Flageul, pri la meritoj de Dro P. Corret, kiu estis fidela propagandisto por nia lingvo. La broŝuro estas tute stenografe skribita. Prezo 3 Fr. fr.


SISTEMA KURSO DE ESPERANTO. — Hendrik Seppik — Enfrid Malmgren. Belaspekta esperanto-lernolibro. Aperis en Haapsalus, Estonio.

INTERŝTATA ESPERANTO-AKORDO PRI LA ENKONDUKA DE ESPERANTO EN LA LERNEJOJN, de D.ro Antoni Czurbrynski, Docento ĉe libera universitato en Varsovio (Polujo). Malgranda broŝuro, pri la tre aktuala problemo.

JUNULAR-SEMAJNO EN NEDERLANDO.

(Aŭgusto 1938)

Unu el la plej ĉarmaj vilaĝoj en Nederlando certe estas la vilaĝo Groet (Grut), parto de la komunumo Schoorl. Kuŝante piede de la dunoj, apud la maro, ĝi estas por multaj nederlandanoj la plej



Strandplezuro.

alloga somerloĝejo.

Precipe por la gejunuloj estas festo vivi tie dum kelka tempo, ĉar la dunoj, la marbordo kaj la maro prezentas belgan okazon ludi en la libera naturo.

Tie la red. de „La Juna Vivo”, en kunlaboro kun „La Norda Stelo” (es-

peranto-unuiĝo en la norda parto de Nord-Holando) organizos somer-restadejon por la internacia junularo.

En la „La Norda Stela”-kunveno en Heldero oni elektis komitaton, kiu konsistas el : S.ro Bant (lernejestro en Groet), prezidanto; F.ino N. den Oude (Alkmaar), kasistino; S.ino E. v. Veenendaal-Bouwes (red.ino „La Juno Vivo”), sekretariino.



Panoramo de Groet.

La komunumestraro de Schoorl disponigis lernejon, kie la gastoj povos manĝi kaj dormi, tiel ke la kostoj por la partoprenontoj estos tre malaltaj : Holandanoj pagos por gastigado dum unu semajno nur 7,50 guldenojn, eksterlandanoj 3,50 guldenojn. Jam nun ni estas certaj, ke venos grupo el Somain (Francujo), sub la gvidado de F.ino Lepachelet. Plej verŝajne venos ankaŭ grupoj el Anglujo kaj Belgujo. Kaj el Nederlando certe multaj partoprenos.

En la venonta numero de „La Juna Vivo” sekvos pluaj sciigoj. Sed mi ne volas fini sen instigo al la eksterlandanoj ŝpari por la vojaĝo. La holandaj esperantistoj atendas vin kun malfermitaj brakoj!

BOVBATALO KAJ PLUVOMBRELO.

En la jaro 1932 mi havis la eblecon aliĝi al la Esperanto-kongreso en Parizo kaj partpreni ĝin. Preskaŭ dumil personoj kunvenis el Anglujo, Francujo, Svedujo, Holando kaj 35 aliaj landoj.

Kiel lingvon ili ĉiuj uzis Esperanton. La kongreso estis inda manifestacio pri la Esperanto-movado. Kaj en la granda ejo de la kongreso ofte kolektiĝis aro de esperantistoj el la plej malproksimaj landoj.

Iun tagon dum la kongreso oni hazarde prezentis min al japana profesoro, franca ekskapitano kaj angla ĉokoladlaboristo. Ili ĉiuj estis emaj interparoli kaj rakonti historiojn.

La anglo havis la econ rakonti historiojn el sia propra vivo, ĉar li multe vojaĝis. Mi provos rerakonti unu el liaj historioj.

„Jam mi vojaĝis en Hispanujo, eĉ vorton ne komprenante de la hispana lingvo. Unu belan tagon mi estis ege malsata kaj havis grandan emon manĝi ĝuste „bifon” (bifstekon) kun fungoj. Vi scias, ke ni angloj estas tre „bifemaj”. Nu, mi eniris en manĝejon, altabliĝis kaj vokis la kelneron. Sed la ulo tute ne komprenis mian anglaĵon. Kion fari? Kiel igi lin kompreni mian deziron? Sed jen! Mi eligis el la poŝo paperon kaj krajonon kaj desegnis sur la paperon belan, nu vi komprenas, bovon, kaj ne malpli belan fungon. Kaj donis la aĵon al la kelnero. La ulo rigardis la artaĵon, ridetis komprenema kaj foriĝis. Sed li igis min longe atendi, eble pli ol tutan horon. Mi estis jam mortonta pro malsatego. Fine li, aĉulo, revenis ŝvitante, kaj proponis al mi — ĉu vi scias, kion? — Jes li surtabligis bileton al bovbatalo kaj — egan pluvombrelon! Ha, ha, ha! Jen kiel la ulo komprenis mian desegnaĵon pri bifsteko kaj fungoj!


(El : SISTEMA CORSO DE ESPERANTO)

VOJAGO AL SVISUJO KAJ PARIZO.
(Priskribo pri unu el la plej belaj tagoj)
 (Foriro el Genève)

Estas la deka tago de nia vojaĝo kaj ni sufiĉe frue ellitiĝos, ĉar ni tiun tagon veturos distancon de proksimume 300 km. Je la kvina mi do leviĝas kaj malfermas la tendon. La suno jam brilas kaj la vetero certe estos bela. Laŭŝajne miaj kunvojaĝantoj ankoraŭ dormas, ĉar regas profunda trankvilo en la tendaro. Ĉi tiun tagon mi apartenas al la „deĵorantoj” kaj mi volas veki la aliajn anojn de nia laborgrupeto, por ke ni tuj ekplenumu nian taskon. Mi do iras al unu el la tendoj en kiuj ili dormas, sed post du aŭ tri paŝoj mi vidas ion belegan : Inter du arbopintoj mi rimarkas la grandiozan pinton de la „Mont Blanc”. Momenton mi dubas, ĉu ĝi vere estas la pinto, kiun ni la antaŭan tagon vane klopodis distingi. Dubo ne eblas; klare mi vidas la tri pintojn, konataj al mi nur laŭ bildkartoj. Mi tuj vekas mian edzinon ankaŭ si ne dubas : tiu monto estas la „Mont Blanc”. Nun mi vekas la aliajn. Mi krias : „La „Mont Blanc” kaj neĝo!” Multaj tuj ellitiĝas kaj rapidas por rigardi la belegan spektaklon. Kelkaj diras : „Jes, estas bone!” Kaj restas en la lito. La antaŭan tagon oni tiom ofte trompetis ilin, ke ili nun ne kredas min. En la aŭtobuso estas tri lornoj kaj baldaŭ staras grupo en noktvestoj, rigardanta la „Mont Blanc”. La pintoj pli kaj pli malklariĝas kaj post dudek minutoj ili tute malaperas pro la leviĝanta nebulo. Ni ĉiuj tre bedaŭras, ke ni ne pli longe povas ĝui la brilan panoramon. Tamen ni estas kontentaj ke ni vidis almenaŭ iom de la alta monto. Nun ni rapide ekprizorgas niajn taskojn, ĉar je la oka ni devos forveturi. Baldaŭ brulas la hejtiloj kaj staras sur ili la kaseroloj, plenaj de akvo. Mi ne plu volas rakonti pri la okupoj, nur ke ni ĝustatempe forveturas.

La vetero estas belega kaj la suno tre pikas. Baldaŭ ni estas ĉe la svis-franca limo, kie ni devas pagi vojaĝimposton. Kaj post kelka tempo ni atingas la „Jura-montaron”. La plej alta pinto estas la „Pinto de Faucille”, pli ol 1400 m. super la marnivelo. La vojo al la pinto estas 11 km. longa, kaj do plialtiĝas proksimume 1000 m., ĉar ni estas jam preskaŭ 500 m. super la maro. La vojo serpentumas supren, ofte farante „harpinglo-kurbojn”. Kiam ni estas proksimume 1000 m. super la maro ni subite denove vidas la „Mont Blanc”. Nia ŝoforo haltigas la aŭtobuson kaj en momento ĉiuj staras ekstere kaj rigardas la faman monton. Pro la nebulo

ni nun ne klare vidas ĝin kaj ni decidas daŭrigi la vojon, ĝis ni estos pli alte super la nebulo. La motoro denove ekfunkcias kaj ni veturas al pli alta loko. La „Mont Blanc” akompanas nin ĉiam jen dekstre, jen maldekstre ni vidas ĝin. Fine, ni trovas bonegan lokon, de kie ni vidas la „Mont Blanc” en ĝia plena beleco. Klare la neĝkampoj nun estas videblaj : la foto montras nian interesigon. Ni tie pasigas duonan horon kaj multaj klopodas fiksi la panoramon sur la impresebla plako. Ni perdis multe da tempo pro la agrabla prokrasto kaj nun urĝe devas adiaŭi la imponan svisan pejzaĝon kaj daŭrigi la vojaĝon. Post la „Pinto de Faucille” la vojo iras iom malsupren kaj zigzagas laŭlonge krutaj, rokecaj kaj surkreskataj vandoj. Ofte ni vidas majestajn panoramojn, jen ĉarmajn valojn sur la deklivoj la paŝtiganta brutaro, la sonorilo ĉe-kole, jen densan arbaron. La farmdomoj ofte estas konstruitaj sur la kruta



deklivo de iu monto, kaj ŝajnas preskaŭ neatingeblaj. Malgrandaj vilaĝoj situas parte en valo, parte sur deklivo kaj ofte mi deziras esti pentristo, tiom pentrinda estas ĉio. Bedaŭrinde mi nur havas fotografilon kaj per tiu ĉi aparato mi ne povas atingi kion pentristo povas, nome fiksi la kolorojn.

Tagmeze ni atingas Diĵon, kie esperantisto zorgis pri la tagmanĝo. Ni malsatas kiel leonoj kaj formanĝas tiom multe, ke la hotelestro baldaŭ sciigas al ni, ke la provizo da terpomoj elĉerpiĝis. Je la sesa ni forlasas Diĵon. Kaj inter ĉi tiu urbo kaj Chatillon ĉe Seine, sur la altebenaĵo de Langres, ni serĉas tendejon, por pasigi la nokton. Post mallonga tempo ni sukcesas trovi taŭgan paŝtejon. La kamparano tuj permesas al ni starigi tie la tendojn kaj baldaŭ

la tendaro estas en bona ordo. Ni ekbruligas la hejtilojn kaj pretigas teon. Kaj dum la serĉlumoj de la aŭtobuso sufiĉe lumigas la tendaron, nia karavano sidas en aŭ antaŭ la tendoj kaj ĝuas pokalon da teo kun torteto.

Tio estas kion ni travivis en nur unu el la 15 tagoj, sed kredis min, ankaŭ en la ceteraj 14 tagoj ni travivis tiom same multe kaj tial ni devas diri, ke la vojaĝo de la „Juna Vivo” estis granda sukceso, kaj multe kontribuis al la por-esperanto-propagando. Multaj homoj, kiuj antaŭe neniam ion aŭdis pri esperanto nun legis sur la tukoj, ambaŭflanke de nia aŭtobuso : „Lernu Esperanton” kaj „Vivu Esperanto”, kaj ofte ni aŭdis, ke ĉirkaŭstarantoj vigle parolas pri nia kara lingvo.

Amsterdam (Ned.)

J. M. v. WEEREN.

KIE

Vasta, vastega estas la mondo,
 mil foje mil stratoj,
 mil foje mil vojoj
 gvidas sencele tra mondon...

Patrinon mi serĉas —
 mi trovi ŝin povas nenie!
 patron mi serĉas —
 mi trovi lin povas nenie!

Jam ambaŭ forlasis infanon — min,
 dolĉeco de infaneco al mi ne estas konata —
 tra vastan, vastegan mondon sola mi
 migras, vagadas senĉese!

Kie, kie ekstaros mi,
 kie mi trovos amikojn?
 — mil foje mil stratoj,
 — mil foje mil vojoj
 gvidas eterne tra mondon min...

Kie, kie mi trovos gefratojn,
 kiuj volonte al mi alproksimiĝos?
 Nenie!
 por mi estas hejmo la stratoj!

Damjan Vahen.

LJUBLJANA (Jug.).

Morto :

La 23-a de Septembro mortis F.ino G. de Waart en Hilversum. Senlace ŝi laboris por nia idealo. Multajn prelegojn ŝi faris pri siaj vojaĝoj kaj de ok jaroj ŝi gvidis esperanto-kursojn de la Popoluniversitato. Plene ŝi dediĉis sin al la esperanto-movado, kiu estis al ŝi kara kvazaŭ relegio.



KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO

1. En jenaj lokoj oni enkondukis la internacian lernolibreton „La Juna Vivo” : Heiloo, Arnhem, Amsterdam, Huizum, Koedijk, Hoorn, Bussum, Gouda, Beverwijk, Soestdijk, Rotterdam, Gorredijk, Volendam (Ned.), Fabrègues (Franc.), Skodborg (Dan.).
2. La unuan jarkolekton oni enkondukis en : Leiden, Heiloo, Lottum (Ned.).
3. En „Ugunskurs” (litova revuo) aperis : „Pri la maldiligenta paŝtisto”, el „L. J. V.”, No 7-37.



KORESPONDADRESOJ

- Ĉeĥoslovakujo** : S.ro J. Szerémi, Zeleznik/Revuca, dez. inters. poŝtm. kun tutmondo. Sendas belegajn hung. kaj ĉsl. ekzemplerojn.
- Danujo** : S.ro P. C. O. Növgaard, Kølviggaard, Sundby, Mors, dez. kor. pri birdoj, abelkulturo, kaj interesanĝi poŝtmarkojn.
- Danujo** : Kamparano deziras korespondi kun gesamideanoj per let. kaj poŝtkartoj. Henning Nielsen, Raahojgaard, Ry.
- Danujo** : S.ro Börge Lemming Maarslet St., dez. interes. poŝtmarkojn.
- Finnlando** : S.ro N. Arpmaa, Petäjärvi, Ryhmä, dez. kor. kaj interes. pm, k. il. gaz. kun tutmondo. Kiu afrankas filatele ricevos esp. gazeton.
- Hungarujo** : S.ro E. Löwy, Abaujszanto, apud Bernardo Fuchs, Kapoly-aiter, dez. koresp. kun tutmondaj esperantistoj kaj filatelistoj.
- Portugalujo** : Juna fino dez. kor. kun ges. anoj. Resp. certa. Fino M. Pereira Duarte. Str. da Misericordia, 37, Ponto Delgada, S. Miguel, Açores.
- Portugalujo** : S.ro Joaquim Carapinha, Aljustrel, Alentejo, dez. kor. kun ges. anoj en Grekujo, Afriko, Oceanio, kaj Azio. Respondo certa.
- Svedujo** : Kvardekjara elektristo, komencanto en esp., dez. kor. per let. kaj kartoj kun ĉiuj landoj. A. Strandman, Hörby.

ANONCETOJ (30 c. por ĉiu linio).

„**LITERATURA MONDO**” plej trafe prezentas al vi nian literaturon. Luksa aspekto, ilustrita. Jarabono 4,50 gld. Specimeno 0,20 gld.

„**LINGVO LIBRO**” informas vin pri ĉiu okazo en nia literaturo. Abonu ĝin kune kun viaj amikoj. Jarabono kaj tri ekz. kune sendataj 0,80 gld, specimeno, 15 cendojn. Ambaŭ revuoj estas mendeblaj ĉe „La Juna Vivo”.

SKRIBA ESPERANTO-KURSO. Ĉu vi jam varbis kursanojn por la skriba kurso! (vidu la aŭgustan-septembran Non de „L. J. V.”)? Taŭgan propagand-materialon vi trovos en la broŝuro de nia flandra samideano Cortvriendt : „Waarom Esperanto”, 24 paĝoj, prezo 6 cendoj.

LEGU ESPERANTO-LITERATURON. En malnovaj numeroj de „La Juna Vivo” ĉiu esperantisto trovos malkaran, varian legaĵon. Por 0,20 gld. (aŭ 2 resp. kup.) oni ricevas 10 ekz., la samajn aŭ diversajn.

„**LA NORDA STELO**” (esp. unuiĝo en la norda parto de N. Holando) kunvenos la 21-an de Novembro en West-Graafthijk. Provizora programo : Antaŭtagmeze laborkunsido. Posttagmeze oni prezentos nemoviĝantan filmon pri „La Juna Vivo”-Vojaĝo al Svisujo, la 10-14 jaraj infanoj prezentos 2 teatraĵetojn („La tro longa pantalono” kaj „Kion faras la patro ĉiam estas bona”), la muzikan parton de la tago prizorgos nia franca samideano, S.ro Dupuis.

VIRINAJ KOLTUKOJ (JUGOSLAVAJ) el silko, triangulaj, kun esperantaj simboloj (amo, paco, frateco). Prezo 0,68 gld. Grando 80 × 80 × 120 cm. Mendeblaj al Red. „La Juna Vivo”.

EL „LA VERKARO DE NIA MAJSTRO” posedu ĉiu Esperantisto almenaŭ kelkajn ekzemplerojn! Fundamento Krestomatio (prezo f 1,30), Lingvaj Respondoj (f 0,55), Proverbaro Esperanta (f 0,55), Fabeloj de Andersen (po f 0,80) troviĝu en ĉiu libroŝranko! Mendeblaj al la Red. de L. J. V.

Esperantaj gazetoj, aboneblaj ĉe ni.

Verda Revuo, monata	jara f 1,50	Literatura Mondo, monata	jara f 4,50
Nia Gazeto, monata	» f 1,35	Niaj Vizagoj, monata	» f 0,65
Scienca Gazeto, dumonata	» f 1,50	Esperanto-Internacia, mon.	» f 2,50
Heroldo de Esp., semajna...	» f 6,80	Bulteno de I.S.A.E., dumo-	
The British Esp., monata	» f 1,20	nata	» f 1,35

Specimenoj : Ni sendas senpage specimemon de „La Juna Vivo”. Specimeno de Literatura Mondo kostas 20 cendojn. Ni ĝenerale havas ekzemplerojn de la aliaj kaj volonte sendas ekz. al iu ajn interesato kontraŭ 5-cenda poŝtmarko holanda aŭ egalvaloro.

Subtenu La Junularlaboron, mendu viajn librojn ĉe la redakcio de
„La Juna Vivo” ! (Petu senpagan libro-liston!!)

AŬTUNA MOTIVO.

En kamen' rubene flagras flam',
 Viajn ŝultrojn kovras dika pledo,
 Tra fenestro grizas panoram',
 Nur asteroj sangas sur la bedo.

Pri aŭtuno telegrafa drat'
 Enuige flustras al ŝoseoj;
 Baldaŭ neĝo, blanka kiel vat',
 Kovros sveltajn pinojn kaj piceojn.

Venu pli proksime al kamen',
 Ĝia flam' vin igos iom revii,
 Lasu fali do la pluvfaden',
 Lasu vin laŭ sonĝrivero remi.

Riga, 1937.

LUDMILA JEVSEJEVA.

Urgajn mendojn oni sendu rekte al la redakcio !!!

PASO POST PASO

Een volledige Esperanto-leergang
 door

J. W. Minke en F. Boom-de Vries

1e deeltje (150 pag.) f 0,75
 2e deeltje (208 pag.) f 0,95

Verschenen bij :

N. V. Uitgevers Mij.

C. A. J. van Dishoeck.

Verkrijgbaar bij „La Juna Vivo”
 (en bij de erkende boekhandelaren).

SKRIBA CORSO

por A. kaj B.

(nur por holandlingvanoj)

Tre detala B-kurso. Gvidanto

Simon Aarse.

Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis.

La Verda Stelo, Radioweg 45,
 Amsterdam-O.

INTERNACIA KANTARO

„LA JUNA VIVO”

Prezo : 0,35 gl.

(5 fr. fr., 0,70 s. kr.)

Ĉiu, kiu verbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace
 jarkolekton de „La Juna Vivo”.

Do multvalora libro de proksimume 200 paĝoj.

Presejo A. Hessens, Bruselo.